

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ elokuu ♦ aŭgusto ♦ 4/2005



*Tali, Minna kaj Karina ĝuas la sinprezenton de Jomo kaj Kim (fone).
Pli da KEF-fotoj sur paĝo 26.*

Aŭtunaj Tagoj ♦ Syyspäivät, s. 14

**Anna-Liisa Heikkinen, p. 6 ♦ Raporto el Valamo, p. 8
Serĉata: plia historia materialo, p. 5 ♦ nova kasisto, p. 20**

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ ef_redakto@surfeu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 15 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 e.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmogatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Anna Ritamäki*

Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ✉ (02) 423 246 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

tuomo.grundstrom

Tuomo Grundström, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 ✉ @lailanet.fi

Taneli Huuskonen, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli.huuskonen@netsonic.fi

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (050) 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@jippii.fi

Auli Vihermä, Riisikuja 11 G, 90460 Oulunsalo. ☎ (08) 554 5587 ✉ auli.viherma@pp.inet.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Timo Pirinen, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ (040) 592 1756 ✉ timo.pirinen@gmail.com

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ saliko@kase.fi

Eero Rinta-Karjanmaa, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Anna-Liisa Heikkinen*

Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): Sampo 800017-230825.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>



De strukturo kaj kono al rekono

Ekde 2003 centre de la EAF-agado troviĝas *Al kvalita komunikado* (AKK). Vi legis pri ĝi, aŭdis pri ĝi dum renkontiĝoj, eble eĉ partoprenis AKK-trejnseminarion. Ne-rektan profiton havis

multaj, interalie legantoj de gazetaraj artikoloj aperintaj pro komunikoj senditaj de EAF. AKK nun eniris sian lastan ferman fazon. Ni antaŭvidu rikolton de abundaj fruktoj dum 2007, la jubilea jaro de EAF, kiun ni preparos ĝis la projektfermo fine de 2006.

La ĉefa celo de Al kvalita komunikado estas struktura, la kreo de la favoraj kondiĉoj, la provizo de la stabila fundamento por kvalita antaŭensalto. Tio respeguliĝas en tio ke inter la tri difinitaj agadkampoj la unua, la plej nevidebla agado, estas la plej prioritata.

”**1. Informa strukturo.** Superrigarda kaj sistemiga laboro, kiu celas krei bazon por analizo de la stato de nia informa agado kaj sekve konduki al informa strategio de nia asocio.”

Ni havas oficejon. Ni havas bibliotekon. Ni havas libroservon. Ni havas personojn, kiuj prizorgas la ĉiutagan korespondadon, pagon de fakturoj kaj ĝisdatigon de membreregistro. Ni havas financajn rutinojn, interalie ĉiujaran peton de subvencio por Esperanta Finnlando, de kio rezultis jare po 1 000-eŭra ŝtata kontribuo. Ni havas regule aperantan organon, bazajn broŝurojn kaj retejon, Dum la projekta periodo ni havas je nia dispono financadon de Fondumo Esperanto. Aldone al funkcianta estraro ni havas projektan grupon, kiu povas dediĉi iom da fortoj al evoluiga agado, io kio alie riskus manki pro la necesa atento al la ĉiutaga funkciado de la asocio.

Ni eĉ havas arkivon, kiu estas grandparte organizita, sed tamen tre malpraktike lokita. Tre

multaj aferoj malklaras pri nia historio. La arkivo kaj nia historio nun bezonas urĝan atenton. Kie ni konservu niajn dokumentojn kaj kiel ni kompletigu ilin? Ĉu eventuale nian librostokon ni povus konservi aliloke por doni spacon al historistudentoj?

Strukturo ne rimarkeblas dum ĝi bonstatas. Tamen, ĝi estas esenca. Pli malfacilus agadi se neniu prizorgus ke en la oficejo ĉiam estu sufiĉa stoko de A4-paperoj kaj ke la rubuoj ne superfluu. Etaj aferoj formas la fundamenton ankaŭ el la vidpunkto de informada sukceso. Ne necesas asocio, ne necesas oficejo, eĉ ne necesas hejma komputilo por sukcesi, sed ĉiaj tiaj aferoj kreas la favorajn kondiĉojn, kiujn ni alstrebas.

”**2. Trejnado de la membraro.** Koscia agado por trejni niajn membrojn pri informa agado kaj por pliklerigi ilin pri la diversaj facetoj de la fenomeno Esperanto vastasence.”


Esperanto estas tiom vasta fenomeno ke eblas ĉiam pliklerigi pri ĝi. Ĉiu el ni povas pli bone lerni la lingvon, la kulturon, la historion kaj la lingvopolitikajn aspektojn. Ni ankaŭ povas lerni la arton de alekstera informado surbaze de spertoj de aliaj asocioj kaj de ĵurnalistoj, kaj, nemalpli grave, surbaze de niaj propraj mispaŝoj kaj sukcesoj. Per trejnado ni povas kreskigi nian memfidon, kiel individuaj esperantistoj, kaj kiel asocio.

”**3. Alekstera informado.** Kontribuo al pli vasta rekono de la valoroj de Esperanto kaj al pli bona ĝenerala nivelo de scioj pri nia lingvo en Finnlando.”

La lingvo esperanto kaj la multflankaj agadoj realigitaj per esperanto meritas rekonon. Estas nia respondeco oferti niajn sciojn al la ĝenerala socio. Esperanto estas tiom valora, ke estus ne respondece kaŝi ĝian realecon de tiuj kiuj ankoraŭ ne scias pri ĝi.

Dankon al ĉiuj agantoj, ĉu nome de EAF, ĉu alikadre, agas en kaj por Esperanto. Ni ĉiuj kontribuas per via kono al nia rekono!

amr



Ŝanĝiĝas la mondo – kaj stabilas Esperanto

Lingvo neniam konserviĝas tute sen ŝanĝoj tra jardekoj kaj jarcentoj. Oni povas distingi multajn malnovstilajn trajtojn de la finna ekzemple en jena ekzemplaĵo el antaŭparolo de lernolibro pri natursciencoj el komenco de la 20-a jarcento:

“Kansakoulun suuri ja kaunis tehtävä on kansan elämän ja tapojen jalostuttaminen. Mutta tätä tarkoituksena ei saavuteta vain sen yleisellä tunnustamisella; jokainen askel, jokainen toimi, jokainen työn välikappale on selvästi ja itsetietoisesti suunnattava tätä päämaalia kohti ja muovattava sen mukaan. (...) Ken näin ajattelee kansakoulun luonnonopetuksesta, sen täytyy vilpittömällä ilolla tervehtiä edessä olevaa oppikirjaa. Sillä monella tavalla aukaisee se uuden uran, varovaisesti tosin ja tasaisesti, mutta kuitenkin niin, että selvästi tuntee edistyvän uusia tarkoituksia kohti. (...) Kun uusi oppikirja ilmestyy varsinkin kansakoulua varten, täytyy sen oikeuttaa ilmestymisensä ansioilla, jotka asettavat sen entisten edelle. Luulen herrojen Forsströmin ja Lindénin kirjan kunnialla tämän vaatimuksen täyttävän. Heinolassa toukokuulla 1900. Mikael Johnsson”

Eble mi prenis la suprajn ekzemplajn frazojn per iom tendenca elekto por la celo montri ŝanĝiĝojn en la lingvo, sed mi certas, ke de preskaŭ kiu ajn teksto el antaŭ jarcento montriĝus la sama. La teksto estas tute komprenebla, sed ĝia ĉiu frazo montras iun etoseton de antikveco: vortformaĵoj kaj vortordoj, kiujn oni ne uzus en la nuna finna lingvo, aŭ kiuj ne plu havas precize la signifon ĉi tie uzatan.

Ĉu Esperanto estas tiurilate simila kun aliaj

lingvoj? Certe iunivele jes, okazis ja kelkaj ŝov-iĝoj kaj novdifinoj de signifoj de vortoj en Esperanto. Tamen tipa trajto de Esperanto estas, ke ĝi ŝanĝiĝas malpli ol aliaj lingvoj kutimas.

La libro “Vojaĝo en Esperanto-lando” de Boris Kolker estas plena de tekstoj el ĉiuj tempoj de ekzisto de Esperanto – ofte mallongigitaj de la redaktoro, sed mi supozas, ke tamen lingve aŭtentikaj. Leginte la libron mi nenie povis rimarki, ke jen estus iu specife antikva stilo de Esperanto.

Por mi estas fascina trajto de la lingvo, ke ĝi tiom stabilas, tiom staras ankrita ĉe la Fundamento, ke mi povas legi tekston el antaŭ pli ol jarcento sen rimarki ajnan esencan ŝanĝon. Por iuj homoj diri, ke Esperanto ne ŝanĝiĝas laŭ tempo, ne tamen estus bona reklamo. Certe multaj pro tio asertus, ke jen vi vidas, ke Esperanto ne funkcias: ĝi ne povas adaptiĝi en la ŝanĝiĝantan mondon.

Ni scias, ke Esperanto tute bone adaptiĝas en ŝanĝiĝantan mondon, almenaŭ tiom bone kiom aliaj lingvoj. Ni tute flue kalkulas bitojn kaj bajtojn de dosieroj sur niaj disketoj kaj KD-oj kaj umas en la interretaj sferoj pri kiuj Zamenhof povis nenion scii.

Sed mi supozas, ke multaj homoj, kaj nuntempe pli multaj ol antaŭe, pensas, ke ŝanĝiĝo per si mem estas io bona kaj aspirinda. La homaro spertis tiom da ŝanĝiĝojn, ke oni jam opinias, ke ŝanĝiĝo de ĉio estas tute normala kaj neprostatato, kaj ke ju pli rapide io ŝanĝiĝas, des pli bone. Inter tia ĉirkaŭo fieri pri tio, ke oni legas tekstojn el 19-a jarcento sen iu ajn problemo pri ŝanĝoj de la lingvo, facile iĝas nur pruvo, ke la afero estas eksmoda kaj ne reprezentas la dinamikon bezonatan en la moderna vivstilo. ▷

Plia historia materialo serĉata – por ke oni ne forgesu

La 100-a datreveno de la fondiĝo de EAF alproksimiĝas kaj pro tio estas grave pristudi la historion de la asocio. La tiutema laborgrupo estis nomumita jam antaŭ du jaroj, sed la laboro bedaŭrinde ne bone progresis – pro personaj kaj materiaj kialoj. Tamen estas ĝoje konstati, ke almenaŭ la historio de FEJO certe pretos dum la jubilea jaro 2007.

La cetera laboro stagnis pro manko de personaj fortoj kaj pro tio, ke la materialoj ne estas en bona ordo kaj ankoraŭ mankas multo. Siatempe Erik von Hertzen ja faris grandan kaj dankindan laboron ordigante la postlasitajn dokumentojn de d-ro Vilho Setälä, sed pro manko de spaco plejparto de ili devis esti poste konservitaj en stokejo, kie ili estas malfacile atingeblaj por studado. La ĉefaj oficialaj dokumentoj de la asocio tamen troviĝas en la oficejo.

Por ricevi bonan tutecan bildon pri tio, kio okazis dum cent jaroj (kaj pli), estas tamen necese trovi pliajn dokumentojn kaj informojn. La historio-libretoj de Iisalmi, Oulu, Tampere kaj Turku estas bonaj koncerne iliajn regionojn, sed mankas scioj pri tio, kio okazis aliloke. Ekz. ĉu ie haveblas informoj kaj dokumentoj pri FLEA (laborista E-asocio) kaj pri fervojista agado? Kie kaj kiam okazis instruado de Esperanto en diversaj lernejoj kaj institutoj aŭ apartaj kursoj kaj

kiu instruis? Kie kaj kiam funkciis diversaj E-kluboj ktp? Protokoloj, membrolistoj, nomoj de aktivuloj estas bezonataj. Gazet-eltondaĵoj kaj fotoj interesas. Mencioj pri Esperanto en ĝeneralaj historio-eldonaĵoj interesas. Utilas eĉ liberformaj surpaperigitaj memoradoj.

Konsciante, ke ne eblas por nur kelkaj entuziasmaj homoj ŝatokupe kolekti kaj trastudi la aferojn por havigi skribitan historion post du jaroj, la laborgrupo bezonas helpon de ĉiuj interesitaj esperantistoj. Se vi volas helpi kolekti informojn, studi dokumentojn kaj ordigi ilin, tiam bv. anonci vin al la subskribinto. Kaj same, se vi hazarde trovos interesajn dokumentojn en via kelo aŭ subtegmento aŭ scias kie tiaj troviĝas, tiam ankaŭ kontaktu. Tamen ne tuj sendu ion sen konsiliĝo.

Se la historio ne pretos dum la jubilea jaro 2007, tamen ĉiu paŝo tiudirekten estas atingajo, kiu helpas.

Jukka Laaksonen

Adr. Orimuskatu 79 B 4

33580 TAMPERE

tel. (03) 255 4724 aŭ

050 582 9248 (lab. 040 754 1360)

jvaleto@kolumbus.fi

Proksimiĝante centjariĝon de nia landa Esperanto-Asocio ni tamen povas fidi, ke io ne subite ŝanĝiĝos: La Esperanto-movado daŭre kaj plu estos eta rondo de eksterordinaruloj, kiu ne minacas revolucie ekinflui la mondon. Iom post iom ni eĉ iĝis tiom nedanĝera movado, ke ni ne plu estas persekutataj de la potenculoj.

Mikko Mäkitalo

Retpoŝta adreso de la ĉefredaktoro ŝanĝiĝas kaj estas nun <ef_redakto@surfeu.fi>. La malnova funkcias paralele ĝis fino de septembro, sed preferu uzu jam tuj la novan.

Intervjuo kun A.-L. Heikkinen

Antaŭ mi sidas honora membro de la Esperanto-Asocio de Finnlando, Anna-Liisa Heikkinen, kiu iom timas, kion mi demandas, sed ŝiaj okuloj amike kaj ĝoje rigardas min. Ŝi ne estas tre parolema, ŝi estas tre modesta kaj precipe ne akceptas laŭdojn. Mi komprenas, ke ŝi povus rakonti multe pli, sed nur singarde ŝi respondas miajn altrudatajn demandojn. Verdire ŝi mem opinias, ke ŝi ne taŭgas esti "honora membro"! Kia miskompreno! Ŝi taŭgas!

*Unue la kutima, neŭtrala demando:
Kiam kaj kiel vi lernis Esperanton?*

A-L: Mi konatiĝis kun Esperanto en 1969, kiam okazis la 54a Universala Kongreso en Helsinko. Unue mi pensis, ke Esperanto estas nur kaŝlingvo, ne io vera kaj utila. Mi tiam vizitadis kurson pri itala lingvo. En mia laborejo, infanĝardeno, mi tamen rakontis al miaj kunlaborantoj pri Esperanto. Unu el ili iris al kurso pri Esperanto. Post kelkaj semajnoj ŝi montris al mi sian lernolibron kaj fieris, kiom rapide ŝi lernas en la kurso. Ŝi invitis min partopreni ŝian kurson, kiun gvidis Jussi Jäntti, uzante la lernolibron "Via dua lingvo" de Veli Kolari. Tie studis proksimume 35 interesatoj unu fojon semajne. Mi komencis kompari mian lernadon en la itala kurso kun ŝia Esperanto, kaj iom post iom mi forlasis la italan kaj ekstudis Esperanton. Oni ja lernas Esperanton pli facile ol la italan, kiu havas multe pli da lernendaj verboformoj.

Post la kurso de J. Jäntti mi pluiris al kurso de J. R. Milton en Kalliola. La nova instruisto ne uzis lernolibron sed la bildserion "Liza kaj Johano". La nombro de la partoprenantaro variis de semajno al semajno. Post la ĉiusemajnaj instruhoroj ni interbabilis malpli formale aŭ aŭskultis la babiladon de pli praktikantaj esperantistoj. La avantaĝo de la kurso estis ĝuste tio, ke ni lernis parolante. Poste oni invitis min al Esperanto-Klubo de Helsinko, kie mi en la 1970aj

jaroj estis elektita estrarano. Mi daŭre estraranas tie.

Ĉu vi konatiĝis kun interesaj homoj per Esperanto?

A-L: Jes, en kongresoj kaj aliaj okazaĵoj oni ĉiam konatiĝas kun novaj interesaj homoj, amikiĝas. Estas facile komuniki en Esperanto eĉ kun nekonatoj. Kaj kvankam mia nomo ne aperas en Pasporta Servo, mi ofte gastigis esperantistojn, ĉar tiuj kiuj vizitas Finnlandon, kutime venas/iras tra Helsinko kaj bezonas tranoktejon kaj gvidanton. Antaŭ nelonge venis itala esperantistino, kun kiu mi vizitis la Muzeon Kiasma, ĉar ŝi nepre volis vidi modernan arton. Neniam mi ridis same multe kiel kun tiu italino en Kiasma. Ni ambaŭ sentis nin kiel infanoj, dank' al nia komuna lingvo. Ankaŭ inter finnaj esperantistoj el la sudo ĝis Laponio mi havas Esperanto-amikojn.

Bonvolu rakonti kelkajn memorojn pri Universalaj Kongresoj!

A-L: Mia unua kongreso estis en 1973, Beograd, la sekva eble estis la plej memorinda, tiu de Hamburg, en 1974, la 59a kongreso. Tiam oni elektis Humphrey Tonkin kiel prezidanton kaj la etoso estis elektra. Maljunuloj ploris, kiam ili devis forlasi la estraron. Nuntempe male! Mi estas feliĉa, ke mi povis viziti plurajn kongresojn. Neniam mi renkontis malafablan kongresanon. Sed ĉiuj kongresoj estas personaj, ĉiu el ni ilin travivas en sia maniero kaj havas siajn specialajn memorojn pri ili. En 1976 mi partoprenis en la UK de Ateno, ho kiel foraj Ateno kaj Grekio tiam ŝajnis al mi! Mi konatiĝis ankaŭ kun Sennacieca Asocio Tutmonda kaj partoprenis ties kongresojn ekzemple en Iisalmi kaj Bordeaux.

Kiam vi komencis helpeti en la oficejo?

A-L: Kiam Vuokko Heinäsuo maljuniĝis, ŝi lasis



la laboron en la oficejo Propra Ejo ĉe Pengerkatu, kaj dum iom da tempo la oficejo ne estis prizorgata. Neniu petis min helpi, sed mi rimarkis, ke estas bezonate, ĉar la oficejo neglektate aspektis.

Kion vi faris en kaj por la oficejo?

A-L: La oficejon oni devas purigadi, mi regule faris la samajn laborojn kiel hejme. Pensu se neniu memorus aĉeti necesejan paperon kaj sapon. Tia laboro estas nevidebla, sed tuj oni rimarkas, se ĝi ne estas farita. Ofte mi deĵoris dum mardoj, kaj kiam ne estis vizitantoj, mi ordigis eltondaĵojn de gazetoj aŭ ordigis librojn en la bretaro. Ĉiam mi trovis ion por fari. La plej kontenta mi estis, kiam venis vizitantoj aŭ telefonvokoj al la oficejo, tiam la laboro ŝajnis utila.

(Anna-Liisa, kiu estas tre modesta homo, ne ŝatus paroli pri ĉio kion ŝi faris sed mi instigas ŝin.)

Ne nur tiaj “nevideblaj” praktikaĵoj okupis vin sed vi respondecis pri multo alia, ĉu ne?

A-L: Nu, jes. Mi komputiligis la enhavon de la biblioteko de la oficejo, vendis lernolibrojn, ĉemizojn kaj aliajn vendataĵojn. Mi estas unu el la estraranoj de KELF (Kristana Esperanto-Ligo Finnlanda). Mi ankaŭ helpis en la loĝejo

de Ahto Linja, kie estis la la arkivo de Vilho Setälä. Tio estis vere interesa laboro por mi, kiu ŝatas historion, kaj tio daŭris kelkajn jarojn. Ho, kiom da skatoloj kaj kestoj, kiom da interesaj dokumentoj inter rubaĵoj! Dum Aŭtunaj Tagoj mi kune kun Olavi Kantele ofte aranĝis ekumenan matenpreĝon kaj kelkfoje diservon, ekzemple en Matteus-preĝejo en Itäkeskus kaj en Tuomiokirkon kappeli. Mi estas ankaŭ la kasisto de EAF ĝis la fino de la jaro 2005. Interesa laboro.

Kiun libron el la biblioteko de EAF vi rekomendus al ĉiuj?

A-L: Mi ne povas rekomendi iun libron al ĉiuj, ĉar la gustoj varias. Unu libro, al kiu mi revenas jaro post jaro antaŭ la kristnasko, estas Muminvalo kaj la rakonto La piceo.

Kaj nun, Anna-Liisa, diru tre mallonge, kion Esperanto donis al vi. Kial vi restis esperantisto tra pli ol 30 jaroj?

A-L: Mi sentas min riĉa kiel esperantisto, mi havas bonegajn geamikojn, karajn memorojn de vojaĝoj, laboroj, kongresoj kaj okazaĵoj. Tio estas riĉeco kiu ne bezonas serurojn.

intervjuis Saliko

Valamo 2005 kun gazetara komuniko kaj intensa kursosemajno

Nia bona kunlaboro kun la Popola Instituto de Valamo ebligis ankaŭ ĉi-jare la kurson, kiu realiĝis 4.-8.7.2005 kun minimuma nombro de gelnantoj. Entute estis 5 kursanoj, de kiuj 2 partoprenis la elementan kurson kaj 3 la daŭrigan. Ambaŭ grupoj estis dum la tagaj lecionoj gvidataj de ambaŭ instruistoj: Mohamed Bettahar komencis la semajnon kun la elementanoj kaj Tiina Oittinen kun la daŭrigantoj. Tiina estis krome ankaŭ ĉi-jare la kursorespondeculo.

La kursosemajno en Valamo enhavas ne nur la lecionojn. Inter ili la partoprenantoj konatiĝos kun la areo kaj ĉirkaŭaĵo de Valamo monaĥejo kaj post la lernado estos komunaj vesperoj kun diversaj programeroj kaj prelegetoj. Esperanto estas ĉiam uzata laŭ volo kaj bezono. Por ele-

mentkursanoj tio donas eblecon aŭdi pli da parolata lingvo kaj por daŭrigantoj ebligas plian uzon de ĝi.

La liberaj programoj estas jam pli malpli tradiciaj: konatiĝo kun la monaĥeja areo, vagado al la kruco de la migranto kun komuna kafumado en la naturo kaj vizito al la monaĥeja tombejo. Ĉi-jara belega vetero allogis la partoprenantojn ankaŭ al ŝipkrozado sur la apuda lago: kelkaj ĉeestis tie eĉ dufoje. Saŭno kaj naĝadado kompreneble ĉiam apartenas al la finna somero.

Vesperaj programoj estis ĉi-jare ekzotikaj kaj kulturaj. Mohamed rakontis al ni pri la diversaj mirindaj aferoj kun kiuj li devis kolizii alvenante al nia lando. Marde vespere ni konatiĝis kun la araba alfabeto kaj eĉ lernis kelkajn esprimojn.



De maldekstre la instruistoj Tiina, Mohamed kaj la elementkursanoj Talvikki Saarenkari kaj Marketta Turunen.

Ĵaŭde ni ricevis du gastojn el Iisalmi, kiuj vigligis nian diskutadon en la internacia lingvo. Ili ĉeestis ankaŭ en nia festa vespermanĝo en Valamo-stilo. Tiam estis tre afable aŭskulti la kantelo-ludadon de Timo Väänänen, li ludis i.a. la kanton pri la sonoriloj en Konevitsa-preĝejo. Kromaj programeroj estis kvizoj de Markku Sarastamo, unu de daŭrantoj, kaj la jam tradicia rakonto pri la krekso, kiun prezentis Timo, legante la tekston esperante, kaj Tiina, legante finne kaj fine ludante per violono la kanton komponita en la poemo Nocturne de Eino Leino.

La kursosemajno estis por ĉiuj tre aldona kaj instruanta kaj samtempe tre afabla kaj amuza. Niaj kursanoj certe lernis multe kaj same ni instruistoj ricevis multon. Al la Popola Instituto de Valamo estis donacita la jarabono de Esperantolehti por ke ili pli bone povos sekvi niajn informojn de la venontjara kurso kaj ankaŭ aliajn aferojn de nia agado.

Antaŭ la kursosemajno estis senditaj gazetaraj komunikoj al lokaj amaskomunikiloj en regionoj Turku kaj Heinävesi. Temis pri instruistoj el Turku kaj pri la nun sesa sinsekva kursosemajno en Valamo. Rezultiĝis du radiointervjuoj, Tiina kaj Mohamed en Turku-radio kaj Tiina en radio de Etelä-Savo (ambaŭ lokaj stacioj de YLE), kaj kelkaj artikoletoj en lokaj gazetoj, i.a. la EAF-prezidanto estis intervjuita. Tio ne portis novajn gelernantojn ĉi-jare, sed estis tamen bona reklamo por la venontjara kurso.

La tradicio de Valamo daŭrigos ja venontsomere. La kursosemajno estos 3.-7.7. kaj Atilio denove pretas veni al Finnlando. Eble ni povos denove laborigi ankaŭ Mohamedon aŭ iun alian instruiston; tio nature dependas de la nombro de gekursanoj.

Bonvenon al Valamo; denove aŭ la unuan fojon!

Tiina Oittinen

Somera esperantokurso en paca monaĥejo de Nova Valamo (4.-8.7.2005)

Frumatene hirundoj flugas inter blankaj nuboj kaj juna monaĥo kun nigra mantelo iras al sonorilejo. Post unu momento sonorilisto ludas kaj mi aŭdas resonadon: Esperantokurso komenciĝas!

Nia kursogrupo estis malgranda kaj preta surpaŝi la vojon al Esperantujo kun du tre bonaj instruistoj. Mohamed Bettahar (denaske de Alĝerio) estis vigla kaj ludema Esperanto-instruisto. Li rakontis seriozajn aferojn ekzemple pri problemoj inter du diversaj kulturoj. Ĝoja horo estis ankaŭ lia momento kun la araba lingvo. (Arabe oni skribas de dekstre al maldekstre).

Tiina Oittinen, nia efika instruistino helpis nin laŭ la vojo dum la tuta kurso.

Ekskurso al la kruco de vaganto

En ortodoksa Karelio oni kutimis starigi krucojn de vaganto por indiki lokojn, kie okazis iu grava religia afero, aŭ por indiki la vojon al sanktigataj lokoj. Por nia ĝojo ni havis ekskurson al la kruco de vaganto en Valamo. Tiina klarigis pri la historio de la kruco, kaj poste ni havis kafon kun kukoj. Ĉe la kruco akvo

estis varmega kaj nimfo de akvo postulis nian viziton. (Naĝado estas malpermesita en la areo de monaĥejo, sed ĉe la kruco estas la limo de areo).

Solena fermo

La lastan vesperon ni havis festotablon á la Valamo. La tablo estis kiel ŝipo, kiu ekiras kaj plenplena de multaj bongustaĵoj. Atmosfero en la vespero estis korema. Timo kaj Tiina ludis kaj ni kantadis. Mohamed ricevis dek+ poentojn pro sia popolvestaĵo.

Dankon

Mi dankas niajn instruistojn kaj partoprenantojn. La tuta kurso estis neforgesebla kaj efika. Nun ni scias multajn novajn vortojn. Ekzemple: Kulo flugas en la varmega aero inter betuloj!? (Hi!).

Ĝis revido en la venonta somero en la monaĥejo de Valamo.

Markku Sarastamo aŭ s-ro Aŭrorejo

P.S. Reino (li diris: Ne Re-in-o!) kaj Onni (s-ro Feliĉo), kiuj vizitis la lastan, plezurigis nin! (Ili venis de Iisalmi).

Finnaj esperantistoj ekskursis tra 5000 jaroj

Preskaŭ 40 esperantistoj ekskursis sabate la 28-an de majo en Ristiina.



Ni renkontiĝis en la vilao de E.N. Setälä kaj Helmi Krohn-Setälä (la gepatroj de Vilho Setälä). Hodiaŭ estas somera lunĉejo en la vilao kaj ekskursanoj (kelkaj manĝis porteblan manĝaĵon ekster la vilao) komencis historiplitenan esplorvojaĝon per lunĉo. Al plelplenstomaka publiko prelegis Jorma Toropainen el Lappeenranta pri la vilao de Kallioniemi laŭ la libro de Salme Setälä (fratino de Vilho Setälä). Poste ni dum kelka tempo konatiĝis kun la interna kaj ekstera partoj de la bela Kallioniemi. ▷

– Invito –

Karaj geamikoj,

Tiu ĉi jaro estas ĝis nun neordinara en mia vivo. Okazis multaj ne antaŭvideblaj aferoj; en esperanta flanko ekzemple la nekutimaj aranĝoj kun la Valamo-kurso kaj aranĝado de Vilna-karavano. Kiam mi skribas tiun ĉi, mi ne ankoraŭ scias kiel (mal)bonege realiĝis la karavano, do eblas nur esperi ĉion bonan al ĝi.

Sed la plej granda persona aranĝo atendas min oktobre. Kelkaj el vi jam scias, ke mi fariĝos tiun ĉi jaron 50-jara (la ekzakta dato estos 2.10.2005). Jam en la jarkomenco mi decidis, ke nun aŭ neniam estas mia vico havi la grandan feston kaj post ioma pensado mi rezervis taŭgan lokon. Tien mi volas inviti ne nur la familianojn, sed ankaŭ ĉiujn miajn geamikojn, kun kiuj mi konatiĝis kaj amikiĝis en diversaj situacioj dum la pasintaj jaroj.

Vi do estas ĉiuj bonvenaj al Turku jene:

*Dato: la 8an de oktobro, 2005 ekde 18a horo,
loko: Malnova Urbodomo, 3a etaĝo*

La festo konsistas de diversaj programeroj: koncerteto de mia orkestro, kelkaj aliaj muzikprezentadoj, teatraĵeto, ĉiĉeronado de mia geokolegoj ktp. Ĉiuj gastoj estas invititaj fari etajn programerojn por ke ni havu afablan feston. Fine ludos bando 'blues'-tipan dancmuzikon.

Se eblos al vi veni al mia festo, bonvolu aliĝi tra Päivi Saarinen. Ŝi afable promesis prizorgi la aliĝojn de esperantistoj kaj ankaŭ doni praktikajn konsilojn al ili, ekzemple pri kie en Turku situas la festloko ktp.

*Ankoraŭfoje bonvenon!
Amike Tiina Oittinen*



Famajn rokpentraĵojn de Astuvansalmi (pentritaj antaŭ 5000 jaroj) rigardadis tiuj sportemuloj, kiujn ne timigis la pada piedirado trikilometra (do, tien kaj reen ses kilometrojn).



La bienula muzeo de Pien-Toijala estis fermita (pro kampa laboro de la mastro), sed ni babilis ekstere inter la konstruaĵoj, kiuj jam jarcentoj situas sialoke. La sama familio posedas la bienon jam ekde la jaro 1672.



Fine de la ekskurso ni vizitis la ruinojn de Brahekastelo apud la vilaĝa centro de moderna Ristiina.

MS

Margareta Handzlik ĉe EU-komisaro

La 5-an de julio la pola eŭroparlamentano Margareta Handzlik (EPP-ED) estis akceptita en Strasburgo de s-ro Jan Figel, membro de la Eŭropa Komisiono pri edukado, kulturo kaj multlingvismo. La renkontiĝo estis plene dediĉita al la problemoj de multlingvismo de EU. Jan Figel aŭskultis kun intereso proponojn de la pola membro de la Eŭropa Parlamento pri ebla uzo de Esperanto kiel propedeŭtika ilo por plifaciligi la studadon de fremdaj lingvoj. S-ro Figel serioze traktis la proponojn kaj petis de Margareta Handzlik plurajn informojn tiurilate. Oni interkonsentis pri pluaj laborkontaktoj.

(el komuniko de UEA prenis mm)

Jarlibro 2005 aperis

Kun moderna kovrila dezajno fare de Ferriol Macip i Bonet aperis Jarlibro 2005 de Universala Esperanto-Asocio. La antaŭparolon de Claude Nourmont, vicprezidantino de UEA, inspiris jubileoj: antaŭ cent jaroj fondiĝis UK kaj la Lingva Komitato, estis eldonita la Fundamento de Esperanto kaj ekaperis la revuo Esperanto.

En la unua parto aperas informoj pri la organoj, instancoj kaj servoj de UEA kaj TEJO, same kiel pri landaj kaj fakaj asocioj, pri edukaj kaj kulturaj organizaĵoj, bibliotekoj k.a. establoj. Oni trovas tie ankaŭ la Esperanto-rezoluciojn de Unesko kaj la gvidliniojn de UEA por informado pri Esperanto. La Jarlibro enhavas ankaŭ multajn anoncojn kaj kuponon, kiu rajtigas je 10-procenta rabato ĉe la libroservo de UEA.

La Delegita Reto de UEA kun 1784 individuoj en 92 landoj havas 53 ĉefdelegitojn, 991 lokajn delegitojn, 133 vicdelegitojn, 36 junularajn kaj 1344 fakajn delegitojn pri ĉ. 800 fakoj. Sian retadreson publikigas 1203 delegitoj, t.e. 67,4% el la tuta delegitaro. Sub la koncernaj urboj aperas kontaktinformoj pri 81 lokaj Esperanto-grupoj en 28 landoj.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

UEA funebras du eminentulojn

Universala Esperanto-Asocio perdis en junio du el siaj plej eminentaj membroj, honoran patronon Lionel Elvin kaj honoran membron Fernando de Diego.

Prof. Herbert Lionel Elvin (7 aŭg 1905 – 14 jun 2005) faris imponan edukistan karieron. Jam 1924, kiam li estis 19-jarulo, aperis lia traduko “El la Skizlibro” de la usona verkisto Washington Irvin. De 1950 ĝis 1956 Elvin estis direktoro de la Eduka Departemento de Unesko. Poste li estis profesoro pri edukado ĉe la Londona Universitato kaj de 1958 ĝis emeritiĝo en 1973 direktoro de ĝia Instituto pri Edukado. Prof. Elvin estis dojeno de la Honora Patrona Komitato de UEA, al kiu li estis invitita jam en 1963.

Fernando de Diego de la Rosa (2 nov 1919 – 30 jun 2005) estis unu el la plej brilaj kaj fekundaj beletristoj en la Esperanta mondo. Inter liaj pli ol 20 tradukvolumoj troviĝas i.a. “Cigana romancaro” de Lorca (1971), “La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha” de Cervantes (1977), “La familio de Pascual Duarte” de Cela (1985), “Cent jaroj de soleco” de García Márquez (1992) kaj “La oldulo kaj la maro” de Hemingway (1996). Tre valoraj estas liaj studoj “Pri Esperanta tradukarto” (1979) kaj “Pri literatura kritiko” (1984). Ekde 1993 Fernando de Diego estis honora membro de UEA.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Fotokonkurso kaj Liro

La redakcio de La Ondo de Esperanto invitas al partopreno de siaj tradiciaj Internacia Fotokonkurso (limdato estas 1-a de decembro) kaj literatura konkurso Liro (limdato 15-a de oktobro). En Liro estas kvin branĉoj pri originala kaj traduka prozo kaj poezio. Vidu detalajn informojn el La Ondo de Esperanto aŭ petu ilin de la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando) *(mm)*

IF informas ...

Ĝuu la internaciecon kaj konatiĝu pli detale kun la plej malnova urbo en Germanio. En promenoj "dumil paŝoj tra dumil-jara urbo" vi povas informiĝi pri la diversaj epokoj, ĉefe pri la romia – kaj vi povas ĝui la simpatian nuntempan centron de Trier.

Dum la tuttaga ekskurso al najbara Luksemburgio viziteblas la pitoreska urboparto de la ĉefurbo kaj la vinvilaĝo Schengen, fama internacie pro la kontrakto de senlima vojaĝo ("ŝengena vizo"). Tie, surŝipe, oni subskribis la kontrakton en 1990.

La aranĝo estas seminario por lingve spertaj personoj, laŭdezire okazas paroligaj kursoj. La infanoj ĝuas paralelan porinfanan programon sub gvido de kunlaborantoj. Pliaj detaloj en interretaj paĝoj: www.internacia-festivalo.de. Festu novjare kun ni!

Hans-Dieter Platz (organizanto)

HDP@internacia-festivalo.de

*22-a IF en germana Trier – nia kadra temo:
Eŭropo pligrandiĝinta*



FEJO porskuttaa edelleen

FEJO-aktiivit ovat viime aikoina olleet kiireisiä KEFin järjestämisessä, mutta kyllä FEJO vielä muutakin tekee! Italian IJF:ssa keväällä oli tuttuun tapaan kaksi FEJOn jäsentä (lue matkakertomus kesäkuun FEJO-Bultenosta ja muista, että taas ensi keväänäkin on kahdelle henkilölle jaossa opetusministeriön tukema Italian matka!) ja tämän lehden ilmestymisen aikoihin käynnissä olevassa IJK:ssa Puolassa on muutama FEJO-ihminen.

Syyskuulle on alustavasti suunniteltu taas FEJO-viikonloppua. Seuraa suunnitelmien kehitymistä sähköpostilistalla ja katso myös FEJOn keväällä uudistuneet www-sivut, nykyään siellä on myös tapahtumakalenteri.

Prezentado de japanaj kostumoj

Post esperantokongresoj en Vilno grupo de japanaj blinduloj vizitos Helsinki. La grupo loĝos en Iiris (Näkövammaisten palvelu- ja toimintakeskus). La grupon gvidos Krizantemo, kiu pretas prezenti japanajn tradiciajn kostumojn (kimono kaj somera kostumo Yukata). Tiu prezentado okazos la 8-an de aŭgusto je 15.45-16.30 en Iiris Marjaniementie 74 (Itäkeskus). Ĉiuj esperantistoj, blinduloj kaj amikoj estas bonvenaj al la prezentado.

Informis Ritva Sabelli

Esperantotemaj artikoloj en aliaj gazetoj

Memoru tuj sendi eltondaĵojn pri esperanto al la oficejo. Tie ili estas tuj arĥivigitaj tiel ke ili estas videblaj por nunaj kaj estontaj vizitantoj de nia oficejo. Ne gravas se ni ricevas pli ol unu de la sama gazetartikolo. Gravas ke ni ricevas la artikolojn, sed eĉ pli bone estas se ĉiu klubo nomumas respondeculon pri artikoloj en la gazetaro. Se vi ne volas sendi la originalon ankaŭ fotokopio bone taŭgas.

FEJO aktivas plu

FEJO-aktivuloj dum lastaj tempoj urĝis pri organizado de KEF, sed FEJO ja faras ankaŭ aliajn aferojn! En la printempa IJF en Italio estis la kutimaj du reprezentantoj de FEJO (legu vojaĝraporton el junia FEJO-Bulteno!) kaj en IJK en Pollando, proksimume nun kiam ĉi tiu gazeto publikiĝas, estas kelkaj FEJO-anoj.

Por septembro ni provizore planis FEJO-semajnfinojn. Sekvu la evoluon de planoj en la retroŝtlisto kaj rigardu ankaŭ la printempe novigitajn retpaĝojn de FEJO, tie nun estas ankaŭ eventokalendaro.

Mikko Mäkitalo

Aŭtunaj Tagoj de EAF

kun seminario en Lesjöfors, Svedio 15.–19.9.2005

Esperantoliteraturo kaj -muziko en Finnlando kaj Svedio

Por Aŭtunaj Tagoj ni vojaĝos al Esperantodomo en Lesjöfors. Ĉi-foje la temo de la tradicia seminario de Sveda Esperanto-Instituto estas kunlabora projekto kun esperantistoj en Finnlando, literatura kaj muzika interŝanĝo inter la du landoj.

Starto estos de la Turkua haveno ĵaude vespere la 15an kaj reveno al la sama loko lunde matene. Dumvoje de Stokholmo al Lesjöfors ni vidos lokojn sub gvido de Anita Dagnarsdotter. Ni lernos i.a. pli pri ferindustrio ĉe la historia ferindustrio Engelsberg, mondheredaĵo agnoskita de Unesko. Reen ni vojaĝos laŭ la suda rando de la regiono Bergslagen.

Esperantodomo situas centre en Lesjöfors, loko kun ĉ. 2000 loĝantoj en la komunumo Fi-

lipstad en Vermlando. La domo estas prizorgata de esperantistoj kiel kursejo kaj gastigejo.

Surloke ni konatiĝos kun la urbeto Lesjöfors kaj ekskursos al la hejmo de fama verkisto Selma Lagerlöf, Mårbacka.

La seminario enhavas esperantoliteraturon kaj -muzikon, kaj originalan kaj tradukitan. Programon prezentos interalie Sten Johansson, Bertil Nilsson kaj Martin Strid el Svedio kaj Anja Karkiainen, Lauri Liukkonen kaj Tiina Oittinen el Finnlando.

La favora paketprezo inkluzivas kajutlilon en la ŝipo, transportojn kaj manĝojn kaj tranoktojn en Esperantodomo. Ĉiu prizorgos mem siajn manĝojn dum la vojaĝo. La ekskursoj kaj muzeaj vizitoj kostas aparte.

Temposkemo

Ĵaŭdo 15.9.2005

ekde 20.00 Terminalo de Viking Line, haveno de Turku, disdono de ŝipbiletoj kun kajutinformoj

21.00 Ekveturo m/s Isabella

Vendredo 16.9.2005

6.30 (loka tempo) Alveno al Stokholmo.

Buso kun svedaj esperantistoj atendas nin, veturo al la Esperantodomo kun vizitoj survoje.

Seminario de Sveda Esperanto-Instituto, manĝoj kaj tranokto (2-6 personoj/ĉambro) en Esperantodomo

Sabato 17.9.2005

Ĉefa seminaria tago. Vizito en Mårbacka.

Dimanĉo 18.9.2005

Posttagmeze ekveturo al Stokholmo

19.00 Alveno al la haveno kaj enŝipiĝo

20.10 Ekveturo m/s Amorella

Lundo 19.9.2005

7.35 matene alveno al Turku

Aliĝo kaj pago

Sendu la aliĝilon al la oficejo de EAF en Helsinko aŭ rete al eafmendoj@esperanto.fi. Por la ŝipo necesas ankaŭ ke ni havu vian naskiĝjaron.

Pagu al la konto de la asocio **Sampo 800017-230825**, referencnumero **4640**.

Notu, ke estas tre grave fari ambaŭ: kaj pagi kaj sendi la aliĝilon.

Ĉar ni nun rezervas lokojn surŝipe, ni devas havi definitivajn listojn de partoprenantoj pli frue ol kutime. Ekde 15.8. ni devas pagi al ŝipkompanio pri troaj malmendoj. Aliĝu tuj!

Kontaktpersonoj

Traknoktoj, manĝoj kaj pri la aranĝoj de la vojaĝo: EAF-sekretario Tiina Oittinen.

Aliĝiloj: Päivi Saarinen en kunlaboro kun la EAF-kasisto.

Programo kaj kunlaboro kun svedoj: Anna Ritamäki kaj Markku Saastamoinen.

Suomen Esperantoliiton syyspäivät 15.9–19.9.2005

*Esperantokirjallisuutta ja -musiikkia
Suomessa ja Ruotsissa*

Tervetuloa mukaan esperantomatkalle Vermlantiin. Osallistumme Ruotsin esperantoinstituutin (Sveda Esperanto-Instituto) seminaariin Lesjöforsissa. Matkaamme esperantokielisen oppaan johdolla läpi Ruotsin ja tutustumme esperantokirjallisuuteen ja -musiikkiin sekä alkuperäisteoksina että käännettyinä. Lesjöforsista teemme retken Mårbackaan Selma Lagelöfin kotimuseoon. Lisätietoja ohjelmasta esperantotekstissä.

Ilmoittautuminen

Lähetä ilmoittautumislomake Suomen Esperantoliiton toimistoon tai vastaavat tiedot sähköpostilla osoitteeseen eafmendoj@esperanto.fi. Tällä kertaa tarvitsemme myös syntymävuotesi laivayhtiön määräysten mukaan.

Maksa osallistumis- ja pakettimaksut ilmoittautumisen mukaisesti liiton tilille Sampo 800017-230825, viitenumero 4640.

Huomaa, että pelkkä maksun hoitaminen ei riitä, tarvitsemme myös ilmoittautumistiedot.

Laivayhtiö edellyttää meiltä lähes lopullista nimilistaa jo noin kuukautta ennen matkaa ja suu-

Aliĝilo

Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF 16.-18.9. 2005.

Ekveturo 15.9. kaj reveno 19.9. de/al Turku.

Nomo _____

Adreso _____

Tel./Fakso/Ret-adreso _____

Naskiĝjaro _____

Aliĝkotizo: eŭroj _____

30e ĝis 8.8.2005 _____

35e poste se restas lokoj _____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj.

Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo.

La kunvena paketo 15.-19.9. kun tranoktoj surŝipe (2-litaj kajutoj) kaj manĝoj kaj tranoktoj en Lesjöfors (2-6-litaj ĉambroj). 150 e _____

Entute pagenda al la konto de EAF _____

Pagoj al la konto: **Sampo 800017-230825**.

Bv. uzi la AT-referencnumeron **4640**.

Pliaj informoj aŭ deziroj:

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando

Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530 Helsinki

aŭ informoj rete al: eafmendoj@esperanto.fi

Ilmoittautumislomake

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton
syyspäiville 16.-18.9.2005.

Lähtö Turusta 15.9. ja paluu 19.9.

Nimi _____

Osoite _____

Puh./fax/sähköposti _____

Syntymävuosi _____

Ilmoittautumismaksu: _____ euroa

30e 8.8.2005 saakka _____

35e myöhemmin, jos paikkoja on _____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä.
Alle 15-vuotiaat ilman maksua.

Kokousmatkapaketti: 150 e _____

AT-paketti 15.-19.9. sis. meno-paluu laivamat-
kan 2-h hyteissä sekä ruokailut ja majoituksen
(2-6-h huoneissa) Lesjöforsissa.

Yhteensä maksettava EAF:n tilille _____

Maksut EAF:n tilille: Sampo **800017-230825**
käyttäen syyspäivien viitenumeroa **4640**.

Lisätietoja tai toivomuksia:

Lähetä ilmoittautumislomake osoitteella:
Suomen Esperantoliitto ry
Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530 Helsinki
tai tiedot s-postitse eafmendoj@esperanto.fi

rista muutoksista 15.8. jälkeen joudumme mah-
dollisesti maksamaan peruutusmaksua. Ilmoit-
taudu siis heti varmistaaksesi mukaantulosi.

Yhteyshenkilöt

Majoitusta, ruokailua ja muita matkajärjestelyjä
koskevat asiat: liiton sihteeri Tiina Oittinen.
Ilmoittautumiset: Päivi Saarinen yhteistyössä
liiton rahastonhoitajan kanssa.

Ohjelma ja yhteistyö ruotsalaisten kanssa:
Anna Ritamäki ja Markku Saastamoinen.

Finlands Esperantoförbunds höstdagar 15.9–19.9.2005

*Esperantolitteratur och -musik
i Finland och Sverige*

Välkommen med på esperantoresa till Värm-
land. Vi deltar i Svenska Esperantoinstitutets
seminarium i Esperantogården i Lesjöfors. Vi
åker genom Sverige med esperantotalande gui-
de och bekantar oss med esperantolitteraturen
och -musiken, både originalverk på esperanto
och översatta. Mer information om programmet
i esperantotexten.

Fondumo Esperanto- säätio 1955–2005

Fondumo Esperanto (FES) festos sian 50-jaran
jubileon la 24an de oktobro en Helsinko. Preleg-
os profesoro Probal Daşgupta.

FES estas fondaĵo, establita en la 1955a jaro.
Ĝian bazan kapitalon donacis Vilho Setälä
(1892-1985). Laŭ ĝia nuna statuto, ĝia ĉefa
tasko estas subteni Esperanto-agadon en Finn-
lando per subvencioj kaj stipendioj.

Estraranoj de la Fondumo estas: Jouko Lind-
stedt (prezidanto), Harri Laine (vicprezidanto),
Simo Raumavirta, Jarkko Laine kaj Jukka Kei-
tele.

Selma Lagerlöf kaj Mårbacka

”Ne eblas ke vi venu al Vermlando kaj ne havu ŝancon viziti Mårbacka, la hejmon de Selma Lagerlöf.” Tion konstatis la svedoj, kiuj invitis nin al literatura kaj kultura aventuro. Ĉi-foje la temo de la tradicia seminario de Sveda Esperanto-Instituto estas kunlabora projekto kun esperantistoj en Finnlando, literatura kaj muzika interŝanĝo inter la du landoj.




Selma Lagerlöf (1858–1940), la unua virino ricevinta la nobelpremion pri literaturo, jam kiel juna knabino loĝanta en Mårbacka decidis ke ŝi volas iĝi verkistino. Kelkaj ŝiaj verkoj, interalie la unua romano *Gösta Berlings saga*, 1891, estas tradukita en esperanton (Gösta Berling, trad. Stellan Engholm, 1934). La konata lernolibro de geografio, ankaŭ fascina romano, *La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson*, aperis en esperanta traduko de Sten Johansson en 2002. La origina *Nils Holgerssons underbara resa genom Sverige* eldoniĝis 1906-07.

Selma Lagerlöf prizorgis ankaŭ la kultivadon de la tero de Mårbacka. Ŝi gvidis entreprenon

kun la nomo Mårbacka Havremjöl (Avenfaruno de Mårbacka). Ŝi aranĝis en 1921-23 rekonstruon de la domo en nobla stilo, interalie kun salono kaj biblioteko.

Fontoj: Vikipedio, la libera enciklopedio <http://eo.wikipedia.org> kaj la retejo de Mårbacka <http://www.marbacka.s.se/>



La fama etulo en esperanto.

La salono en Mårbacka.



Esperanto-säätiö (FES) viettää 50-vuotisjuhlaansa 24. lokakuuta Helsingissä. Luennoitsijana on professori Probal Dasgupta.

FES on perustettu 1955. Sen perustamispäätös lahoitti fil.tri. hc. Vilho Setälä (1892-1985). Nykyisten sääntöjensä perusteella se keskittyy suomalaisen esperantotoiminnan tukemiseen avustuksin ja apurahoin.

Säätiön hallituksen jäsenet ovat: Jouko Lindstedt (puheenjohtaja), Harri Laine (varapuheenjohtaja), Simo Raumavirta, Jarkko Laine ja Jukka Keitele.

Adreso – Osoite

Fondumo Esperanto-säätiö

Jouko Lindstedt

Vasamakatu 2 as. 13

FI-15100 Lahti

Retpoŝte: jouko.lindstedt@helsinki.fi

Redaktita de amr surbaze de la FES-retejo / Toimitti amr FES:in kotisivuihin perustuen: <http://www.helsinki.fi/~jslindst/esperanto.html>

Estraro kunvenis

Kunveno 5/2005, 10.4. en Källkullen, Kimito.

Ĉeestis Ritamäki, Oittinen, Saarinen, Saastamoinen, Vihermä, Pirinen kaj Jukka Laaksonen, revizoro, Paula Niinikorpi, librotenisto, Mikko Mäkitalo, ĉefredaktoro de EF, daŭro 10.20-12.00. La kunveno okazis lige al semajnfina laborkunveno de la projekto Al kvalita komunikado [pri la stato de la projekto vidu alian artikolon de tiu ĉi numero].

Kontrakto kun Esperanto-klubo de Helsinki pri la uzo de la oficejo (Sopimus toimiston käytöstä) estis prilaborita dum la kunsido. Ĝi reguligas la komunan prizorgon de la oficejo, kiun posedas EAF je 60 procentoj, EKH je 40 procentoj. Interalie la jenaj dividoj de respondecoj estas menciitaj: EAF pagas la ĉiumonatan sumon al la domkompanio kaj EKH pagas sian procentaĵon al EAF. La respondecon pri la elektra fakturo havas EAF, pri la aĉeto de purigiloj EKH. Ĉiu asocio respondecas pri siaj propraj iloj. En la nuna situacio ekzemple EAF havas kopimaŝinon kaj aliaj rajtas uzi ĝin kondiĉe ke ili notas siajn kopiojn en kajeron.

La kontrakto tamen ne estas tiom detala ke ĝi priskribas kiel funkcias pri la kopimaŝino. Ĝi celas nur doni klarajn kadrojn por bona funkcio de la oficejo. En la kontrakto estas skribita ke pri la plenumaj detaloj respondecas oficeja grupo (toimistoryhmä), kiu raportas al la estraroj. En la oficeja grupo estas po unu reprezentanto de ambaŭ posedantaj asocioj. Al la kunvenoj ankaŭ FEJO-representanto estu invitata. Krom EAF kaj EKH ankaŭ la membrasocietoj rajtas sen aparta pago uzi la oficejon por siaj renkontiĝoj.

EAF elektis kiel sian reprezentanton por la oficeja grupo Päivi Saarinen (vice Tiina Oittinen).

La aranĝo, ke la asocio estu la nova peranto de UEA-pagoj ekde 2005, estas akceptita de

UEA/ĝenerala direktoro Osmo Buller.

Markku Saastamoinen planis reprezenti la asocion en la jarkunveno kaj seminario de UN-asocio la 20.4.2005 en Helsinki, vojaĝkostoj sub buĝeto de la projekto AKK: partopreno en trejnaj eventoj. [Raporto pri lia partopreno aperis en EF 3/05]

Kunveno 6/2005, 19.6. en la oficejo

Ĉeestis Ritamäki, Oittinen (sekretario), Huuskonen, Saarinen, Saastamoinen, Pirinen, daŭro 12.30-16.10.

La estraro konstatis la elekton de la funkciuloj kaj la komisiitojn por la laborperiodo 2005 ĝis la sekva jarkunsido:

Estraro de fonduso Propra Ejo: Jukka Laaksonen (EAF), Anna-Liisa Heikkinen, Harri Laine.

Estraro de junulara fonduso: Anna Ritamäki (EAF), vice Päivi Saarinen kaj Paula Niinikorpi (FEJO), vice Pipsa Ahonen.

Esperantolehti: Redakta grupo: Mikko Mäkitalo (ĉefred.), Anna Ritamäki (respondeca red.), Ilkka Santtila (teknika redatoro). Konstantaj kunlaborantoj: Raita Pyhälä, Jukka Laaksonen, Seija Kettunen (Jyväskylä), Jukka Noponen (muut lehdet), Riitta Hämäläinen kaj Katja Lampinen (FEJO), Taneli Huuskonen (adresaro), Tiina Oittinen (Turku, sekretario de EAF), observantoj: Päivi Saarinen kaj Jukka Pietiläinen.

Interreto: EAF: Päivi Saarinen (kunordiganto), Jukka Pietiläinen (prizorganto), Jukka Noponen (kunlaboranto); EKH: Sakari Kauppinen; FEJO: Patrik Austin.

Instruado kaj lernomaterialo, kontaktoj kun ELFI: Tiina Oittinen.

Valamo-grupo: Tiina Oittinen (kunordiganto), Carola Antskog (ELFI), Sylvia Hämäläinen, Jukka Laaksonen kaj Raita Pyhälä.

Prelegvojaĝoj (turneoj): Tiina Oittinen.

Stipendioj: Päivi Saarinen.

Movada historio de Finnlando, historia grupo: Jukka Laaksonen (prez.), Jukka Pietiläinen, Mikko Mäkitalo (FEJO). Pri la oficejo EAF-

kontaktulo: Päivi Saarinen.

Jura konsilanto: Sakari Kauppinen.

Doma kompanio Siltasaarenkatu 15: Anna-Liisa Heikkinen.

Oficeja biblioteko: Ritva Sabelli, Anna-Liisa Heikkinen.

Biblioteka grupo kadre de AKK-projekto: Päivi Saarinen (kunordiganto), Paula Harju, Sirkka Mattlin, Tuuli Åkerman.

Libroservo: Päivi Saarinen.

UEA-peranto: EAF/Päivi Saarinen.

Membroregistro kaj adresaro: Taneli Huuskonen.

Suomen YK-liitto (UN-asocio de Finnlando): Anna Ritamäki.

Nordia kunlaboranto: Markku Saastamoinen.

Eŭropa agado, membro de la asembleo de EEU: Anna Ritamäki, anstataŭanto Carola Antskog.

Vortara grupo: Jouko Lindstedt (ĉefredaktoro), Osmo Buller, Riitta Hämäläinen, Harri Laine, Raita Pyhälä (redaktoroj por vortaj artikoloj). Anna Ritamäki estas la EAF-kontaktulo de la grupo.

Projekta grupo Al kvalita komunikado: Anna Ritamäki, Tiina Oittinen, Päivi Saarinen, Jukka Pietiläinen, Markku Saastamoinen, Tuomo Grundström.

La kontrakto pri la oficejo estis subskribita en la kunsido (flanke de EKH Taneli Huuskonen, prezidanto kaj flanke de EAF la prezidanto kaj la sekretario). EKH pritraktis la kontrakto-proponon en sia juna kunsido. La oficeja grupo jam havis kunsidon 8.6.2005 kaj decidis pri ŝlosiloj kaj deĵorvicoj. Ĉeestis en la kunsido Päivi Saarinen (EAF), Taneli Huuskonen (EKH) kaj Katja Lampinen (FEJO).

Taneli Huuskonen ĉeestis la jarkunvenon de la domkompanio Siltasaarenkatu 15. Pro la malbona financa situacio de la domkompanio okazos plialtigo de la prizorgpago (yhtiövastike). Krome la domkompanio devos kolekti ekstran pagon por renovigaj laboroj (rahoitusvastike), kiujn EAF kaj EKH pagos unufoje. Nova kasisto

de EKH estas Henry Heinonen.

La estraro konstatis ke laŭ pritakso la financa rezulto de Vintraj Tagoj en Orivesi montras ioman profiton.

Päivi Saarinen vizitis ĉe Heta Kesälä kaj aranĝis transporton de ĉiuj UEA-delegitaj kaj aliaj dokumentoj al la oficejo. Heta ankaŭ donacis librojn kaj ni aĉetis de ŝi 30 ekz. de la Vilkkivortaro. La antaŭa UEA-peranta konto estas fermita kaj ni devis malfermi novan [notico pri tio en tiu ĉi numero].

EAF-kasisto Anna-Liisa Heikkinen sciigis tra la prezidanto, ke ne plu eblos al ŝi prizorgi la taskon ekde 2006. La estraro respektas ŝian decidon kaj dankas pro la multjara laboro. Nova kasisto estas serĉata.

La estraro pritraktis la planojn por Aŭtunaj Tagoj en Lesjöfors kaj la situacion pri la Valamokursoj (tiam estis 4+4 aliĝintoj). Kiel anstataŭanto por la instruisto Atilio Orellana Rojas estis trovita Mohamed Bettahar. EAF pretas rekompenci kelkajn kostojn de la instruisto kaj de la kursorespondeculo por ke la kurso realiĝu malgraŭ la neatingita minimumo de 10 partoprenantoj. (EAF kutime pagas la vojaĝkostojn ĝis Finnlando de eksterlanda instruisto. Ĉi-jare tiaj kostoj ne estas.) Krom Valamo indas studi aliajn kursolokojn por someraj kursoj, ekzemple Orivesi-instituto montris intereson. Gravus, ke ĉiu somero estas kurso(j) en Finnlando.

La prezidanto sendis al Fondumo Esperanto -säätiö (FES) AKK-projektan raporton pri la dua fazo kaj monpeton por la tria. FES decidis, ke EAF ne ricevos en 2005 plian monon por la projekto, sed povas atendi la lastajn 10 000 eŭrojn komence de 2006. Sekva FES-kunsido okazos aŭtune.

EAF intencas sendi membrovarban leteron al personoj, kiuj montris intereson pri esperanto, interalie mendante lernolibron. Ni tamen ne sukcesis realigi tion ĉi-printempe. Ni klopodos denove por la sekva jaro.

Sekva kunveno estis decidita por la 20a de aŭgusto 2005 en la oficejo.

EAF serĉas novan kasiston!

Multjara kasisto de EAF Anna-Liisa Heikkinen sciigis al la estraro, ke ne plu eblos al ŝi prizorgi la taskon ekde 2006. La estraro respektas ŝian decidon kaj dankegas al ŝi pro la kompetenta laboro.

Nun estas bezonata nova persono por prizorgi la kasistan taskon. La kasisto prizorgas, ke fakturoj de la asocio estos pagitaj ĝustatempe, sekvas la informojn en konteltiroj de ĉiuj asociaj kontoj kaj kunlabore kun la librotenisto informas al la estraro pri la mona situacio de la asocio. Krome al kasistaj taskoj apartenas kunlabore kun la estraro fari eventualajn ŝanĝojn en la asociaj deponoj. Kune kun la librotenisto la kasisto preparos la bilancon, kiun la estraro proponas al la jarkunveno por akcepto. La kasisto kunlabore kun la estraro kaj librotenisto faras

ankaŭ la buĝeton de la asocio, kiun la jarkunveno akceptas.

Se vi sentas, ke tiuj estas taskoj kiujn vi scipovas kaj pretas fari por EAF, vi estas la persono kiun ni serĉas. Vi ricevos eblecon pagi la fakturojn komputile. Tiel ne necesas, ke vi loĝas en Helsinki-regiono. La kasisto ne necese estas estrarmembro, sed prefeble ĉeestu la estrarkunsidojn plej eble ofte. Kompreneble la tuta estraro, la librotenisto kaj ankaŭ la antaŭa kasisto helpos vin kun la praktikaĵoj. Kontaktu tuj kun la prezidanto, la vicprezidanto aŭ kun la nuna kasisto de EAF por pliaj informoj de la tasko (kontaktinformoj sur paĝo 2)! Venu kunlabori por la asocio!

La estraro

EAF etsii uutta rahastonhoitajaa!

Suomen Esperantoliiton monivuotinen rahastonhoitaja Anna-Liisa Heikkinen jättää tehtävän vuoden 2005 lopussa. Hallitus kiittää Anna-Liisaa erinomaisesti hoidetusta työstä.

Rahastonhoitaja huolehtii liiton laskujen maksuista ja seuraa liiton pankkitilien ja sijoitusten tilannetta. Hän raportoi tiedot hallitukselle, jonka kanssa yhteistyössä tehdään mahdolliset muutokset. Yhdessä kirjanpitäjän kanssa rahastonhoitaja valmistelee tuloslaskelman ja taseen, jotka liiton hallitus esittää vuosikokoukselle. Rahastonhoitaja osallistuu myös liiton budjetin laadintaan yhteistyössä hallituksen ja kirjanpitäjän kanssa. Hänen ei välttämättä tarvitse asua pääkaupunkiseudulla, sillä pankkiasiat voidaan hoitaa pitkälti sähköisesti. Rahastonhoitajan ei myöskään tarvitse olla hallituksen jäsen, mutta

hänen toivotaan mahdollisimman usein osallistuvan hallituksen kokouksiin. On tarpeen ymmärtää jossain määrin esperantoa, sillä useat käsiteltävistä asiakirjoista, esimerkiksi hallituksen pöytäkirjat, laaditaan tällä kielellä.

Jos huomaat, että nämä tehtävät ovat juuri sinua varten, olet etsimämme henkilö! Pehdyttämisvaiheessa saat apua aiemmalta rahastonhoitajalta ja jatkossa tukenasi ovat kirjanpitäjä sekä tietenkin liiton hallitus. Lisätietoja tehtävistä saat nykyiseltä rahastonhoitajalta, Anna-Liisalta, sekä liiton puheenjohtaja Annalta tai varapuheenjohtaja Päiviltä (yhteystiedot sivulla 2). Ota heihin viipymättä yhteyttä ja ilmoittaudu tehtävään! Tervetuloa mukaan liiton toimintaan!

Hallitus

Uusi tili UEA-maksuille

Tuttu tilinumero UEA-maksuille jää historiaan ja pyydämme jatkossa käyttämään seuraavaa tiliä: **Sampo 800020-5995369** (UEA/EAF Päivi Saarinen).

Kuten tähänkin asti selvitykset maksujen sisällöstä lähetetään samaan aikaan maksun välittäjälle, postitse joko Suomen Esperantoliiton toimistoon tai suoraan Päivi Saariselle, yhteystiedot s. 2., tai sähköpostitse osoitteella eafoficejo@esperanto.fi.

Uuden tilin kautta välitetään edelleen jäsenmaksuja, kongressi-ilmoittautumisia ja -tilauksia, lehtitilauksia ja muita maksuja toivomustenne mukaan. Valitamme kaikkia sekaannuksia ja hankaluuksia, joita tilanteen muuttuminen aiheutti UEA:n maksujen välityksessä. Toivomme jatkossa asioiden sujuvan ongelmitta.

EAF:n hallitus

Nova konto por UEA-pagoj

Por pagoj al UEA nun estas nova kontonumero. Bedaŭrinde ne eblis transpreni la kutiman bankokonton por perado de UEA-pagoj kaj ni devis malfermi novan peranto-konton.

La nova kontonumero estas: **Sampo 800020-5995369** (UEA/EAF Päivi Saarinen).

Kiam vi pagos al ĝi, bonvolu informi al EAF pri la enhavo de la pago per letero al la oficejo aŭ per retpoŝto al eafoficejo@esperanto.fi (atingas Päivi Saarinen). Se vi preferas telefoni, ankaŭ tio eblas. La telefonnumero de Päivi Saarinen troviĝas ĉiam sur p. 2 (sub estraro).

Ankaŭ la kontonumero ĉiam troveblas sur p. 2 de la gazeto. (En Jarlibro 2005 de UEA bedaŭrinde aperas la malnova, ne plu funkcia kontonumero.)

Per la nova konto ni daŭre peras membrokotizojn, kongresajn kotizojn kaj mendojn, gazetajn mendojn kaj aliajn pagojn laŭ viaj deziroj. Ni bedaŭras ĉiujn malklarecojn kaŭzitajn de la ŝanĝo kaj esperas ke ekde nun ni povas servi en normala ordo.

La estraro de EAF

La jubilea simbolo – arĝente!



Nun vi povas kompletigi vian veston per la jubilea simbolo de Esperanto!

Firmao *Hetta Silver* en Enontekiö produktis arĝentajn broĉojn en du grandecoj por Esperanto-Asocio de Finnlando. Sur la malantaŭa flanko de la simboloj troviĝas eta gravuraĵo EAF.

La partoprenantoj de Aŭtunaj Tagoj 2004 povis unuaj konatiĝi kun la novaĵo. Nun vi ĉiuj havas la ŝancon!

Mendu ĉe la libroservo: Esperanto-Asocio de Finnlando, Päivi Saarinen, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, aŭ retpoŝte: eafmendoj@esperanto.fi.

La eta pinglo kostas 12 e, la broĉo 30 e.

Al kvalita komunikado – cele al ĉiuinspira festo

Al kvalita komunikado (AKK, finne: Laatu viestintään, svede: Kvalitet i kommunikationen) estas EAF-projekto por levi la kvalitan nivelon de la informa agado. Post la preparoj en 2003 ni lanĉis la projekton dum la Aŭtunaj Tagoj en Raŭmo. Fine de la ĉi-jara marto finiĝis la dua fazo de la projekto kaj, cele al vere pinta agado okaze de la 100-jariĝo de EAF, ni daŭrigas la AKK-projekton ĝis la fino de 2006.

Ni strebas krei vere favorajn kondiĉojn por sukcesa tutjara, tutlanda, ĉiuinspira festo. Pli pri la festo vi povas legi sekvanumere, kie ni prezentos ideojn kolektitajn. Tamen, jam nun vi povas noti gravan daton, sabaton la 28an de aprilo 2007. Tiusabate ni povos festi ke pasis ekzakte 100 jaroj de la fondiĝo.

Se via klubo deziras vizitantan gaston de EAF, vi estas bonvena kontakti nin. Ni strebas viziti ĉiujn klubojn kadre de antaŭjubilea turneo.

Pri niaj projektgrupaj kunvenoj

La projekta grupo kunvenis oficiale dufoje dum la dua fazo: 20.7. kaj 11.12 en Helsinki. Krome la grupo kunvenis kelkfoje en aliaj kuntekstoj ekzemple por aranĝi la trejnseminarion oktobre kaj por taksi la rezultojn de la dua fazo en marto.

Ni realigis semajnfinan AKK-laborkunvenon en Kimito 9-10 aprilo, jam en la periodo de la tria fazo. Tie ni donis grandan atenton al la preparoj por la jubilea jaro 2007 kaj al la ordigo de la daŭra funkciado de la oficejaj praktikaĵoj kun klarigo de respondecoj.

Sekvafoje la AKK-projekta grupo kunsidis en la oficejo 18 an de junio 2005 kaj decidis i.a. pri la subtenpeto de Antaŭen por Vekilo, kiu estas grava esperantoinformilo. Ni volas instigi al plia uzo de Vekilo en informado. La projekta grupo konatiĝis kun la stokejo en Neljäs linja kaj diskutis pri eblecoj plibonigi la situacion.

Nun la stokejo estas tro plenŝtopita kaj malfacile uzebla.

Pri niaj projektaj financoj

Dum la unua fazo ni por AKK elspezis, rondigite, 5 200 eŭrojn por AKK, en la dua fazo 4 600 eŭrojn.

La realigitaj elspezoj

Unua fazo, februaro 2003 – fino de marto 2004
Ricevita subvencio de 7 500 eŭroj, projektaj elspezoj 5 200,72 eŭroj.

Dua fazo, aprilo 2004 – marto 2005 (buĝeto interkrampe)

Informa strukturo

1244,25 eŭroj (4500)

- Kunvenoj (vojaĝ- kaj manĝokostoj, eventualaj tranoktokostoj) 797,75 eŭroj (2000)
- Komunikadaj kostoj (telefonaj, retpoŝtaj kaj poŝtaj, multobligado) 283,25 eŭroj (700)
- Grafika identeco (planado, presado kaj alia utiligo) 0,00 eŭroj (1500)
- Bibliotekaj kostoj (novaĉetoj kaj aliaj kostoj por biblioteka evoluigo) 163,25 eŭroj (300)

Trejnado de la membroj

3176,22 eŭroj (3400)

- Trejnseminario 2810,75 eŭroj (2000)
- Invito de fakuloj 253,37 eŭroj (600)
- Partoprenoj en trejnaj eventoj 112,10 eŭroj (600)
- Aliaj trejnaj kostoj 0,00 eŭroj (200)

Alekstera informado

192,70 eŭroj (1900)

- Okazigo de informaj eventoj (okazigo de

Muut lehdet

eventoj por ekstera informado)

0,00 eŭroj (1000)

- Foirpartoprenoj (informado pri Esperanto en eventoj okazigitaj de aliaj)

0,00 eŭroj (500)

- Turneoj kun informa efiko

192,70 eŭroj (400)

Sume por la dua fazo

4613,17 eŭroj (9800)

Ricevita aldona subvencio de 7 500 eŭroj, restanta subvencio sume 5 186,11 eŭroj

Tria fazo, aprilo 2005 – decembro 2006

Kostoj sume proks. 15 200 eŭroj

(la jam ricevita 5 186,11 + 10 000-eŭra subvencio, pagita ekz. 4000 e en 2005 kaj 6000 e en 2006)

La lastan eron de la projekta financado de Fondumo Esperanto, 10 000 eŭrojn, ni antaŭvidas ricevi sekvajare.

Anna Ritamäki

Eventokalendaro de EAF

2005

15-19.9.05 Aŭtunaj Tagoj, kuna vojaĝo + seminario, Lesjöfors, Svedio (EAF, SEI)

EAF-laborkunvenoj

20.8.05 EAF-estraro

2006

marto Vintraj Tagoj en Turkuo

3-7.7.2006 Esperantokursoj en Valamo (Valamon kansanopisto)

29.7-5.8.2006 Universala Kongreso, Florenco, Italio (UEA)

2007

28.4.2007 100-jariĝo de EAF

Esperanto-kesäparatiisi

Orimattilan Sanomat kirjoitti 19. kesäkuuta Ori-mattilassa toimivan Pro Esperanto -yhdistyksen toiminnasta ja toimintapaikasta, Ali-Seppälän tilasta, Esperanto-kesäparatiisista. Yhdistyksen perustaja ja vetäjä Börje Eriksson kertoi, että tilalla pyritään yhdistämään ekologinen ajattelutapa ja kulttuuri. Yhdistyksen nimi tulee Esperantosta, ”esper” tarkoittaa toivoa ja ”arto” taidetta, Esperanto.

Tilalla järjestetään muun toiminnan lisäksi esperantokursseja. Erikssonin mukaan esperanto on neutraali viestintäväline ja siitä puuttuu tietyn, yhden kulttuurin ja yhden kielen erityispiirteet. Kielen käyttäjien mukaan ihmiskunta on perhe. Jutussa esitellään Ali-Seppälän tilalla vierailleita eri maiden kansalaisia.

Hanke on saanut EU:n Leader-rahoitusta.

Orimattilan Sanomien kinalojutussa esiteltiin lyhyesti esperanton historia, josta kertoi tilalla vierailut Raita Pyhälä. Hän kertoi myös vuosittaisista kansainvälisistä esperanto-kokouksista ja esperantistien yhteydenpidosta kirjeenvaihdolla sekä Pasporta Servon toimintaperiaatteesta.

Kaleva-lehden Pressiteekki-osastossa esiteltiin ranskalainen lukion oppilas Kristina Slaveykova, joka opiskeli koulussaan esperantoa yhtenä kielivaihtoehtona.

Jutussa kerrataan esperanton synty Zamenhofin keksintönä sekä mainitaan, että Unesco kannustaa maailman valtioita kielen opettamisessa. Jutussa todetaan, että esperantoa on helpompi oppia kuin englantia tai ranskaa ja että sanasto on otettu eri kielistä.

Pasporta Servon avulla esperantistit voivat majoittua ympäri maailmaa, olla kirjeenvaihdossa esperantoa käyttäen eri puolille maailmaa ja lukea sillä kirjoitettua kirjallisuutta.

Jukka Noponen

Ĉu trakti, intertrakti aŭ negoci?

En retroŝta listo *EAF-agadas@yahoogroups.com* ekiĝis iom da diskuto pri ŝoviĝo de signifo de Esperantaj vortoj sub influo de aliaj lingvoj. Estas klare, ke la plej grava influanto estas la angla, kaj kiam ekzistas tia vorto en Esperanto, kiu similas vorton en la angla, la signifo en Esperanta minacas ŝoviĝi al tiu signifo, kiun la angla vorto havas. Problemo en la fenomeno estas, ke se oni lasas vortojn tiel ŝoviĝi, baldaŭ neniu scias, kiel la vortoj en Esperanto estas difinitaj.

Ŝoviĝoj de signifoj dum ekzisto de Esperanto ja okazis, kaj kelkajn oni akceptis. Ekzemple *ŝati* havis originan signifon “alte taksi”, tiel estinte proksimume sinonimo por *estimi*. Ŝajnas, ke *ami* kaj *plaĉi* ne tute kovris la bezonatan signifon, por kio esperantistoj do adoptis la vorton *ŝati*. En la Plena Ilustrita Vortaro (PIV) de 1970 oni ankoraŭ avertas pri la efektiva ŝoviĝo de ĝia signifo, sed la nova PIV de 2002 ŝajnas jam silente akcepti ĝin.

Alia ekzemplo estas *kazo*, kiu origine signifis nur juĝejan aferon – sed oni bezonis kaj komencis uzi ĝin ankaŭ en pli vasta signifo.

Unu problema vorto estas *negoco*, kiu laŭ difino signifas aferon, kies celo estas monprofito, aŭ komercan entreprenon – kaj (laŭ PIV) nenion alian. Tamen oni facile tendencas pensi, ke *negoci* ankaŭ signifus diskuton pri kondiĉoj por atingi interkonsenton – tio ja estas la signifo de *negotiate* en la angla. Rimarkinde, almenaŭ en la finna-Esperanta poŝvortaro de Vilkki kaj Faven, kiun EAF daŭre vendas, legeblas, ke “*negoci* = käydä kauppaa, neuvotella”, la dua signifo estante ĝuste la ŝoviĝinta.

Vorto por tiu signifo tamen ekzistas, kaj ĉiam ekzistis – ĝi estas *trakti*. Ĝia sola signifo menciata en la Fundamento de Esperanto estas ĝuste

tio, kaj ankoraŭ tio estas ĝia unua signifo en PIV.

Problemo tamen estas, ke la reganta signifo de *trakti* en la nuna uzo estas ĝia dua PIV-a signifo: “tia- aŭ alimaniere agi, kondukti kontraŭ iu aŭ io”, kiu en la finna tradukiĝas “*käsitellä, kohdella*”. Ŝajnas, ke al origina Esperanto mankis vorto por tio, kaj oni do adoptis *trakti* por tio. Tiel tamen iĝis ĝia uzo en la origina signifo problema.

Por distingi klare la signifojn, oni ofte uzas *intertrakti* por la origina signifo de *trakti*, per kio la efektivaj tradukoj de la finna estas:

käsitellä = *trakti*

neuvotella = *intertrakti*

Nuntempe oni povas praktike taksi aferojn per interretaj provoj, pri kio Jouko Lindstedt konstatas:

Kiam mi rigardas en Google, ŝajnas ke “traktas +kaj +estas” donas ĉefe frazojn kun la signifo “käsitellä”, kaj “intertraktas +kaj +estas” donas frazojn kun “neuvotella”. Do, oni povus diri ke nur historie la signifo “neuvotella” estas la unua, nuntempe tiu “käsitellä” estas la ĉefa, kvankam “neuvotella” ne malaperis.

...kaj pri la signifoj ĝenerale li konsilas:

“Trakti” certe havas ambaŭ signifojn nuntempe, tiusence ne troviĝas problemo. Se oni volas precizigi, mi dirus “intertrakti” por “neuvotella” kaj “pritrakti” por “käsitellä”.

Sed laŭ mi restas la problemo, ke se oni konas vorton *trakti* en ĝia kutima signifo, kiu en la finnan tradukiĝas “*käsitellä*”, oni ne facile konjektas, ke indus diri *intertrakti* por traduki la finnan “*neuvotella*”. Tial mi emas konkludi, ke oni tamen kuraĝu laŭvole uzi *negoci* en la ŝoviĝinta signifo. Ja ĉiu “*neuvottelu*” tamen estas

negoco almenaŭ en tiom liberigita senco de la vorto, ke oni nur ne strikte celas *monan* profiton.

Pri tio tamen Jouko Lindstedt rimarkigas:

Rimarku ankaŭ, ke se "negoci" komencas signifi "(inter)trakti", ni havas novan problem-on – kiel traduki la anglan "business"? "Negoco(j)" estas ofte (kvankam ne ĉiam!) bona traduko por ĝi.

Eble do enkonduki novan vorton *bisneso* (aŭ ĉu prefere *bizneso*) en Esperanton? Mi scias, ke ankaŭ daŭra enkondukado de novaj vortoj en la lingvon minacas formi senfinan marĉon, kie pereos la esenca simpleco de Esperanto, sed en tiu kazo ĝi ŝajnus la plej praktika solvo.

Mikko Mäkitalo


Priparolinda temo

Mi opinias, ke Saliko dum instruo de la lingvoj larĝe uzas bildojn, por ke la lernantoj ne sole aŭdu, aŭ legu, sed ankaŭ vidu signifon de la novaj lernataj vortoj. Tiun ĉi opinion certigas artikoleto "Housut jalkaan vai jalat housuun?" en Esperantolehti 3/2005. Ankaŭ mi uzas similan bildigon dum lerno de finna lingvo. Mi rimarkis, ke la bildoj de kvazaŭ samsignifaj vortoj de diversaj lingvoj ne koincidas. En la finna lingvo tiuj ofte estas pli abstraktaj. Do tiuj postulas uzi pli matematikecajn figurojn.

Mi opinias, ke la temo estas interesa kaj priparolinda.

Vilorg Teräväinen


duplustro



KEF 2005

Unuaj impresoj el la etoso de Kultura Esperanto Festivalo

Arnau Torras prezentas siajn komiksajn albumojn. Ankaŭ Duplustro, kiun konatigis la paĝoj de EF, aperis sur la muroj de la KEF-ejo.



Raporto pri KEF aperos en la sekva numero.

*Fotis Anna
Ritamäki*



Alejandro Cossavella kaj Flávio Fonseca dum neformala, nature muzika sinprezento antaŭ la publiko.



"La patro de KEF" Per Aarne Fritzon kaj Lena, gepatroj de eta Minna (dancanta en la kovrila bildo).

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ taneli.huuskonen@netsonic.fi www.esperanto.fi/helsinki
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi.
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 ✉ kari.kettunen@pp1.inet.fi
- ♦ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ✉ martti.pennanen@phnet.fi
- ♦ Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu.
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla. ✉ matti.wallius@ebaana.net
- ♦ Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Lauri Liukkonen, Varstatie 37, 37500 Lempäälä, ✉ lauri.liukkonen@jippii.fi)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ✉ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ fejo@esperanto.fi. Tilinro: 563000-2213606
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2005 on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla, Hämeenlinnassa ja Taivalkoskella.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2005**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
5	1.9.	15.9.	5.10.
6	1.11.	15.11.	5.12.

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: eaflehti@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

Ilmoitukset joko sähköpostitse: eaflehti@esperanto.fi tai suoraan liiton toimistoon: Esperantolehti/EAF, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki



Esperantolehden yhteyskortti

Lahjatilaus: vuosikerta _ _ _ _ .

Lahjatilauksen saajan nimi ja osoite:

(Lahjatilauksen maksajan nimi ja os. kortin alaosaan)

Tilaukseni päättyy _ / _ _ .

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Osoitteeni muuttuu _ / _ _ alkaen.

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Uusi osoitteeni on:

Kestotilaus vuosikerrasta _ _ _ _ alkaen.

Tilaus: vuosikerta _ _ _ _ .

Tilaaajan, kestotilaaajan tai lahjatilauksen maksajan nimi ja osoite. Osoitetarran paikka:

**Posti-
merkki**

**Suomen
Esperantoliitto ry.**

**Siltasaarenkatu 15 C 65
00530 Helsinki**

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy lokakuussa. Jutut 15.9.2005 mennessä EAF:n toimistoon. Venonta numero aperos en oktobro. Artikoloj ĝis 15.9.2005 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <eaflehti@esperanto.fi>.